**La babiladaj rondoj** okazas vendrede je la 19a horo. La gastiganto mem preparas simplan manĝaĵon (**ĉef**manĝon kaj deserton). La invititoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Je la fino ĉiuj donacas monon al la gastiganto por kontribui al liaj elspezoj. Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens ĉiu kontribuas ankaŭ al la lupago de la salono. (Fr 80.-).

**Aliĝu al unu aŭ la alia grupo perrete ĉi-sube.**

**"Ambaŭ grupoj"** en Espace Dickens : la venonta renkontiĝo okazos **vendrede, la 19-an de majo**. Françoise Pétermann invitas nin.

## "Okcidenta grupo" :

**vendrede, la 2-an de junio**
ĉe Elisabeth Renaud
ch. du Presbytère 7, Lausanne
079 589 81 55

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

## "Orienta grupo" :

**vendrede, la 9-an de junio**
ĉe Cléa Robin
ch. de Culat 20, Vouvry
024 481 33 06 / 079 330 04 03

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6

**La bazara budo** okazos sa, la 20-an de majo sur la placo Sankta-Francisko kaj sa, la 10-an de junio sur la placo *La Palud*.
**Nepre aliĝu al**: http://doodle.com/poll/6hgepagnb58it434


## Laŭzana Esperanto - Societo

ĉe F. Randin - ch. de Vallombreuse 14 * CH - 1004 LAUSANNE
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 -
Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

junio 2017 - n° 06

## Sabate, la 17-an de junio
## Jara ekskurso en Friburgo



Vizito de la muzeo *Gutenberg* kaj tiu de la kudriloj.

Rapidegu aliĝi se ne jam estas pagite.
(plej lasta limdato: la 21-a de majo)
La programo troviĝas en la aneksaĵo. de la aprila informilo no 4.

## Somera paŭzo



**Lunde, la 4-an de septembro:** *Decidota*
**Lunde, la 2-an de oktobro:** *Decidota*

## Pensaĵo (Louise Hay, usona verkistino)



*Samtempe kiam mi modifas*
*miajn pensojn, laŭmezure*
*la mondo ĉirkaŭ mi transformiĝas.*

# Novaĵo: Esperanta grupo naskiĝis en Valezo.

*Esperanto vivas. Esperanto disvastiĝas !*

Christian Darbellay invitis multe da esperantistoj el ła franca parto de Svislando por diskuti pri la kreado de esperanta klubo en Valezo.

Respondante al li, 24 samideanoj retroviĝis la 13-an de majo en kafejo en Martigny: aAnoj el nia grupo de Laŭzano, el CDELI en La Chaux-de-Fonds, el SES, ankaŭ sinjorino E. de Mestral, estrino de la svisa ĥoro, kaj nature el Valezo, eĉ el Piemonto.

Post kiam ĉiu prezentis sin, Christian Darbellay malfermis la diskuton pri la kreado de valeza grupo. Ĉiuj subtenis lian projekton. Do naskiĝas la Valeza esperanto-klubo por ren**tk**ontiĝoj, praktiko de la internacia lingvo kaj por kulturaj ekskursoj. Bondezirojn kaj plenan sukceson al ĝi!

Por konkretigi tiun novaĵon, ni kontentigis kune niajn stomakojn per agrabla manĝaĵo kaj niajn mensojn per la vizito de la fondaĵo Gianadda.

# Malfacila faciligo

Foje, post vizito ĉe unu el mia amiko-samlandano en Francujo, mi vojaĝis reen en mian loĝurbon Parizon. Enirinte la vagonon mi trovis en ĝi junan sinjoron oscedanta pro soleca enuo. Kiam miaj okuloj alkutimiĝis al la laca lamplumo de la vagonkupeo, mi rimarkis Esperantistan steleton en lia butontruo. Oni facile povas prezenti al si mian ĝojon, ĉar mi, hungaro, neperfekte parolas francan lingvon.

- Bonan vesperon, sinjoro, mi diras al li, proponante manpremon. Reciproka ekĝojiĝo, interbabilado, k.t.p.

Dum la halto de la vagonaro ĉe unu stacio mi eliras el ĝi por trinki glaseton da biero. Post mia reenvagoniĝo mi proponas al mia kunvojaĝanto fari la samon, ĉar "tie oni servas eksterordinare bonan bieron".

- Mi ne kuraĝas elvagoniĝi, respondas li, ĉar mi timas, ke mi ne retrovos mian vagonon.
- Rigardu ĝian numeron !
- Jes, sinjoro, sed mia cerbo estas tre malrememorema, mi ĉiam forgesas la numerojn.
- Ho, kara mia, oni devas fiksi la numeron al iu konata historio aŭ simila fakto. Jen ekzemple la numero de mia vagono estas 1038. En tiu jaro mortis Sankta Stefano, la unua reĝo de mia lando. Revenante do mi pensis pri la morto de Sankta Stefano, kaj do mi tuj retrovis mian vagonon.
- Bonega ideo, li ekkriis, kaj forlasis la vagonon.

Post kelkaj minutoj oni donas signon por ekirigo de la vagonaro. Mia franco ne estas ankoraŭ reveninta. Mi elrigardas tra la fenestro por serĉi kaj voki lin. Kaj kion mi vidas kaj aŭdas? Li, ekscitite, preskaŭ plorante, petas la dejorantan policiston sur la perono:

- Sinjoro, pro la ĉielo, mi vin petegas, diru al mi en kiu jaro mortis Sankta Stefano, reĝo de Hungarujo?



*De P. DE LENGYEL*
*El Esperanto Legolibro, de Elio Migliorini*